

Morfologio kaj sintakso de Esperanto. Paĝo 6 (15.10.2010)

33 jaroj da perfektigo

En 1974 en la rusia urbo Ufa aperis modesta broŝuro *Metodikaj rekomendoj pri la lingvo Esperanto* – fakte, malgranda lernolibro, kies aŭtoro estis tiam juna instruisto de Esperanto kaj movada aktivulo Boris Kolker. La lernilo estis tiom sukcesa, ke ĝi estis kelkfoje reeldonata kaj multfoje diversrimede multobligata kaj fariĝis la plej populara en la tiama Sovetio. Dekmiloj da esperantistoj ekposedis la lingvon helpe de ĝi; plejparto de nunaj ruslingvaj movadaj aktivuloj estas „lernintoj de Kolker”. En 1992 la lernolibron eldonis moskva akademio eldonejo *Nauka*; ĝi uzeblas (kaj konstante uzatas) en Interreto.

Tamen post la lasta papera eldono pasis 15 jaroj, kaj aperis bezono ĝisdatigi kaj perfektigi la libron. Do, la aŭtoro denove reviziis kaj aktualigis la lernilon, kaj la eldonejo *Impeto* entreprenis la novan belaspektan eldonon – rezulton de la 33-jara perfektigo de la furoraĵo.

Kio distingas tiun ĉi lernolibron de aliaj kaj kie kuŝas la kaŭzoj de ĝia populareco kaj efikeco? Unue, en la scienca aliro al la kompilo. La aŭtoro, mem sciencisto-filologo, zorge kombinis diversajn, malfacile kunmetebajn principojn (oftecon de leksemoj kaj ilian laŭteman enkondukon, kompleksan prezenton de gramatiko kaj taŭgajn ekzercojn, ktp, ktp).

Due, la lernolibro alvokas perfektigi en la lingvo plu kaj partopreni la movadon. Por tio estas destinitaj pluraj tekstoj en la lecionoj kaj la suplemento, kiu estas la unua leciono el alia furorlibro (jam internaciskale!) de la sama aŭtoro – *Vojaĝo en Esperanto-lando* – do la deziranto jam scias pri tio, kiel „enloĝiĝi” post la kursofino en Esperantujo, kion fari kaj kion legi por plu kreski!

Trie, kaj plej grave, la lernolibro ne nur instruas gramatikon kaj leksikon, ne nur enkondukas en la Esperanto-kulturon – tion faras ankaŭ aliaj – ĝi celas prepari ne simple bonan lingvoparolanton, sed ankaŭ aktivan movadanon, konscian propagandiston de Esperanto kaj ĝia interna ideo. Por tio fine de ĉiu el la 20 lecionoj troviĝas fragmentoj el ruslingvaj sciencaj artikoloj kaj doktoraj disertacioj pri interlingvistiko kaj esperantologio, bonaj priesperantaj artikoloj el gravaj gazetoj, fragmentoj de beletraĵoj de famaj verkistoj, kiuj pozitive rememoras sian uzadon de Esperanto, ktp. Do, fininte la kurson (ĉu ĉeestanta, ĉu korespondanta aŭ interretanta, ĉu okupiĝanta memstare), la studanto estos bone armita per la plej gravaj kaj precizaj informoj kaj argumentoj, kiuj apogas la disvastigan entuziasmon de la nova adepto je firma bazo. Cetere, la lasta tasko de la lasta leciono sonas jene: „Verku ruse artikolon pri la problemo de internacia lingvo kaj Esperanto ...”

Certe, la lernolibro estas direktita al ruslingvanoj, kaj alilingva instruisto ne povas rekte apliki ĝin por siaj lernantoj (bedaŭrinde!). Sed uzi iujn materialojn el ĝi por prepari lecionojn ŝi/li, tamen, povas kun bona rezulto. Temas, ekzemple, pri interesaj primovadaj tekstoj en lecionoj 14-20, ekzercoj pri vortfarado kaj pri uzo de prepozicioj (kio preskaŭ ne ekzistas en aliaj lernolibroj), vasta uzo de proverboj kaj aforismoj. Tial ĝi havindas ankaŭ por ĉiu bona Esperanto-instruisto, kiu eĉ ne unu vorton komprenas en la rusa.

Boris Kolker: Международный язык ЭСПЕРАНТО – полный учебник. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro. Eld. Impeto, Moskvo, 2007. 264 paĝoj. ISBN 978-5-7161-0172-2.

Artikolo de Nikolao Gudskov el *Monato* (www.monato.net)

<http://www.esperanto.be/fel/2008/>